

Informilo de Ĝemelaj Urboj

Reta revueto de UEA pri la projekto "Ĝemelaj Urboj"

Jaro 3 N-ro 4 (11) decembro de 2004

NOVAĴO

Ne nur al mi sed al ĉiuj

En la lasta aprilo Osmo Buller re-transprenis la ĝeneralan direktoron de UEA kaj siatempe estis en la okupiteco. Spite al tio Osmo Buller nelonge turnis sin al la projekto "Ĝemelaj Urboj", en sia retmesaĝo li skribis: "Kara amiko, Jam kelkfoje mi intencis skribi al vi, sed aliaj urĝaj taskoj malhelpis tion. Nun mi tamen sukcesas sendi al vi kelkajn liniojn, antaŭ ĉio por kore gratuli vin pro via aktivado sur la kampo de ĝemelurba agado. En mallonga tempo vi sukcesis fari mirindan laboron, kies plej sentebla signo estas via reta bulteno. La bulteno kunigas jam multajn aktivulojn tra la tuta mondo kaj estas por ili riĉa fonto de ideoj, ĉar ĝiaj raportoj ebligas al ĉiu leganto lerni el la spertoj de aliaj agantoj. Lastatempe mi legis n-ro 9 de la Informilo de Ĝemelaj Urboj. Tre riĉa enhavo denove, kun bela omaĝo al s-ro Stanley Nisbet. Mian intereson kaptis ankaŭ la artikolo pri Tampere, urbo el mia propra lando kun vigla loka movado..." La vortoj de Osmo Buller kuraĝigis min, mi pensis, kaj ĉiujn partoprenantajn kaj subtenantajn la projekto. Tio intense esprimis la atenton de UEA al la progreso de la projekto. Menciindas, ke s-ro Osmo Buller ĉiam subtenis la projekton. Tion sciis ĉiuj legitaj nian revueton.--komisiito

Salutvortoj al Michela Lipari

Mi ne kontaktus ŝin sen Esperanto, mi ne amikiĝus kun ŝi sen Esperanto, mi ne havus ŝancon kunlabori kun ŝi sen la projekto "Ĝemelaj Urboj". Ŝiaj karakterizoj je optimismo, klareco kaj zorgemo faris sur min profundan impreson. Ŝi estas unu el la gravaj kontribuantoj de la projekto. De fermentado de laborplano de la projekto al ĝia funkciigo ŝi partoprenis la tuton, la konciza laborplano de la projekto rezultis el ŝia saĝeco. Al ĉiu numero de Informilo de Ĝemelaj Urboj ŝi aldonis siajn komentariojn kaj kuraĝon. Ekde la naskiĝo de la projekto ŝi klopodis por ĝia progreso. Estis ŝia aktiveco kiu unufoje aperigis raporton pri ĝemelaj urboj en la kongresaj dokumentoj de la 87-a UK. Estis ŝia iniciatemo kiu igis la projekton fariĝi la diskutotemo dum la 88-a UK. Estis ŝia efika penado kiu sukcesigis kaj garantiis la ĝhustatempan okazon de la unua kunveno pri ĝemelaj urboj dum la 89-a UK. Mi sentis plezurecon en kunlaboro kun ŝi. Ŝi ja estas s-ino Michela Lipari, eks-estrarano de UEA kaj unu el la unuaj funkciuloj de la projekto. Ŝia instigo helpis min venki malfacilaĵojn, ŝia gvido akcelis min progresigi la projekton. Aperinte la nova estraro de UEA en la 89-a UK s-ino Michela Lipari ne plu estis la funkciulino, sed oni neforgesis ŝian kontribuon al la projekto. Ĉi tie kiel komisiito de la projekto mi kore dankas s-inon Michela Lipari pro sia elstara faro al la projekto, mi profunde kredas, ke ŝi daŭrigos sian subtenon al la projekto.-----Wu Guojiang

La projekto, parto de laborplano de UEA por 2003-2005

Antaŭ la 89-a UK ĉiu komitatano ricevis kelkajn dokumentojn de UEA. En la raporto de Renato Corsetti pri la laborplano menciis la projekton en la sekcio "Utiligado" de la plano de UEA--2003-2005. Estis tiel skribita: UEA subtenu la utiligon de Esperanto fare de lokaj Esperanto-kluboj en pluraj manieroj kaj tute aparte serve al la sistemo de rilatoj inter ĝemelaj urboj.

Signifa vizito, grava okazo

S-ro Yas Kawamura laboras kiel redaktoro de la japana gazeto "Nova Vojo" kaj ĝenerala direktoro de EPA (Esperanto-Propaganda Asocio), kiuj loĝas en la urbo Kameoka. En la pasinta septembro li partoprenis karavanon kun 31 personoj gviditan de s-ro Kurijama Masataka, urbestro de Kameoka, al Aŭstrio por celebri la 40-an ĝemeliĝon de du urboj: Kameoka kaj Knittelfeld.

En Aŭstrio s-ro Yas ĉeestis serion da festaranĝoj, inkluzive de kunsido, festoceremonio, arbo-plantado, vespermanĝ-kunveno, vizitoj al muzeo, memorŝtono kaj mezlernejo, ktp. Li esprimis siajn salutovortojn al la publiko en la urbo-halo de Knittelfeld.

En Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno li persone vidis la atestilon pri ĝemeliĝo inter la du urboj skribitan en tri lingvoj: germana, Esperanto kaj japana, en la 14-a de aprilo, 1964. En la atestilo havis tian enhavon: "Post unuanimaj decidoj de iliaj laŭ konstituciaj reprezentantoj 15.10.63 La urboj Kameoka en Japanujo kaj Knittelfeld en Stirio, Aŭstrio decidis kaj proklamas sian ĝemeliĝon, ĉar ili deziras, tiel esprimi sian sinceran kaj firman pacamon donante ekzemplon al tuta la mondo." Post 40 jaroj en Knittelfeld li honore vidis la tutan proceson de deklaracio-subskribo kiu estis plenumita de la nunaj du urbestroj: s-ro Schafarik (Knittelfeld) kaj s-ro Kurijama (Kameoka) por festo de la 40-a datreveno. La tuta enhavo de la deklaracio skribita en tri lingvoj japana, Esperanto kaj germana, estas: ke "Memore al 40jara jubileo de sia ĝemeliĝo por sia amikeco en paco du urboj, Kameoka kaj Knittelfeld, deklaras al la mondo, ke ni antaŭenpuŝos fortan deziron por realigi pacon, en sinceraj kaj firmaj volo: dezirante la unuiĝon sub konstanta paco, grandanimeco kaj reciproka interkonsento. Kiel la signo de danko ni aldonas nomojn de du advokatoj de nia ĝemeliĝo: s-ro Eizo ITO el Kameoka, d-ro Adolf Harbedl el Knittelfeld.". Indas menci, ke S-ro Eizo ITO kaj d-ro Adolf Harbedl ja estas esperantistoj!

Sur la strato nomata "Kameoka-strato" en la urbo, s-ro Yas ankaŭ vizitis la memorŝtonon de ĝemeliĝo, kies Esperanto-signo estis aldonita de s-ro Schafarik, kiu funde alte taksas E-ton kaj la movadon kaj esprimis, ke eĉ se preskaŭ neniuj esperantistoj estas en la urbo. sekvonta aktuala temo estu krei E-komunumon en la urbo. (resumita el la raporto de s-ro Yas Kawamuro)

[**komentario**] La vizito de s-ro Yas al Aŭstrio estis sukcesa vizito. Ĝemeliĝo inter Knittelfeld kaj Kameoka estis modelo kaj ekzemplo de Esperanto aplikita al interurba ĝemeliĝo. La atestilo kaj deklaracio estis gravaj dokumentoj progresigi la projekton "Ĝemelaj Urboj". Ĉi tie mi esprimas mian elkoran saluton al la du urbestroj kun sincera amo al paco kaj Esperanto, kaj al Herbert, Christian, Leopold, Martin kaj liaj koleginoj, kiuj Esperante helpis la agadon de s-ro Yas en Vieno kaj Knittelfeld.---la komisiito

Forpaso de s-ro Gerrit J. Brons

La komisiito triste informiĝis, ke subtenanto de nia projekto kaj entuziasma leginto de Informilo Ĝemelaj Urboj, delegito de UEA en Maassluis, Nederlando, s-ro Gerrit J. Brons forpasis en la 12-a de novembro, 2004. La komisiito sendis al la familio de s-ro Gerrit la funebnan saluton pere de s-ro Cor Brons, filo de Gerrit .

La projekto allogis grandan atenton en Zamenhof-festo de LEA

Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA), Ĉinio, okazigis Zamenhof-feston en la pasinta decembro en la gubernio Qingyuan. La komisiito faris specialan raporton pri la projekto "Ĝemelaj

Urboj", kiu vekis grandan intereson de ĉeestintoj, inkluzive de la estroj de la gubernia registaro.

Honoro al la komisiito

En septembro surbaze de kontribuo al Esperanto Liaoning-provinca Federacio de Socisciencaj Asocioj oficiale engaĝis s-ron Wu Guojiang, kaj alian samideaninon, s-ino Jiao Xiyang el LEA kiel provincajn konsultajn specialistojn pri popularigo de socisciencoj.

La projekto en gazeto

1. S-ro Zhang Shaoji, prezidanto de Guangzhou-urba Esperanto-Asocio kaj entuziasma subtenanto de la projekto, menciis la unuan kunvenon pri ĝemelaj urboj en sia artikolo "Mia UK" aperinta en n-ro 3 Verda Spiko, trimonata organo de Guangdong-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio. Li invitive prelegis en Internacia Kongresa Universitato de la 89-a UK.

2. N-ro 8-10, 2004, Informilo de Ĉina Esperanto-Ligo raportis la unuan kunvenon pri ĝemelaj urboj en siaj kongresaj numeroj, nome, en n-ro 8-10, 2004.

URBA STILO KAJ TRAJTO

Hanojo kaj sia Internacia Esperanto-Konkurso

Tre estimataj gesinjoroj, karaj gekamaradoj, karaj gesamideanoj,

Okaze de la 1000-a jubileo de Thang Long (malnova nomo de Hanojo),---1010-2010—HANEA (Hanaja Esperanto-Asocio) organizas Internacian Esperantan Konkurson por ĉiuj geesperantistoj en la tuta mondo kiuj scipovas Esperanton kaj simpatias al nia lando, nia ĉefurbo. La konkurso daŭras 10 jarojn ekde 2000 ĝis la fino de la jaro 2010. La lingvo uzata estas Esperanto kaj la konkurso estas rezervata nur por eksterlandanoj.

Komence de la jaro 2000, ĝis nun, ni jam efektivigis 3 fojojn de la konkurso. Kaj ĉiu konkurso solvas unu dinastion de la historio de Vjetnamio. Jene estas la bilanco de 3 konkursoj jam plenumitaj:

- La unuafon partoprenis 123 konkursintoj de 35 landoj.
- La duafojon partoprenis 105 konkursintoj de 29 landoj.
- La triafon partoprenis 116 konkursintoj de 26 landoj.

Pri la longeco de la dinastio de LE – posta, la kvara etapo lanĉita en ĉiujaro daŭras solvi tiun dinastion en 5 demandojn.

Multaj konkursintoj esprimas sian simpatian al nia ĉefurbo, nia popolo, priskribita per emociaj vortoj "Se mi ĝuste respondas, mi tuj sendas mian foton. Se mi eraras, sciigu min kaj mi tuj sendos alian konkursaĵon" (s-ro PENG, Wuhan, Hubei provinco, Ĉinio), kaj "Mi jam estis en Hanojo, ĉio bone kuŝas en mia menso, vere dirite, en mia koro" (Sino Testuto, Italio). La premioj estas modestaj, sed la afabla kontribuo de konkursintoj stimulas nin ege antaŭenpuŝi nian komunan noblan laboron.

Kiel jam anoncite, pliaj detaloj kaj la rezultoj de la konkurso legeblas ĉe la ttt-ejo: <http://www.hanea.vnn.vn> Por aliaj samideanoj, ni invitas ĉiujn partopreni la kvaran konkurson fiksita por la jaro 2004, kaj ni deziras al ili bonan sukceson en la lotado de la futuraj premitoj. Bonvenon al vi ĉiuj. (Ĉi teksto estis la tuta parolado farita de s-ro Le Thanh Thuoc, vic-prezidanto de Vjetnamia Esperanto-Asocio en la unua kunveno pri ĝemelaj urboj, la redaktoro faris nenian ĝustigon krom aldono de la titolo).

INTER ĜEMELAJ URBOJ

Kunlaboro inter ĝemelaj urboj Changzhou kaj Takatuki

La 89a Universala Kongreso de Esperanto okazos en julio kurantjare en Pekino, Ĉinio, kies E-movado jam multe progresas kaj disvolviĝas post la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986. La lokaj E-movadoj en Ĉinio multe kaj aktive akcelis kaj akcelas la landan E-mavadon. Ĉar lokaj E-movadoj estas fundamentoj de la landa E-movado. Ne povas esti la landa movado sen la lokaj movadoj.

De 1988 nia urbo Changzhou en provinco Jiangsu, kiu situas meze inter Shanghai kaj Nankino, havas ĝemelan rilaton al la urbo Takatuki, Japanio. Aparte menciindas, ke nia asocio Changzhou-a Esperanto-Asocio ĝemeliĝis al Esperanto-Societo en Takatuki jam en 1986, du jarojn pli frue ol kiam ambaŭ urbestroj oficiale subskribis la kontrakton de la ĝemelaj urboj.

Iun vesperon en januaro de 1986 esperanta elsendo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) diskonigis la novaĵon pri la fondiĝo de la Changzhou-a Esperanto-Asocio. Aŭdinte tion la membrino de Esperanto-Societo en Takatuki s-ino Takeuti Tomiko, nia estimata kaj forpasinta amikino, kiu estis unu el la plej fidelaj aŭskultantoj de ĈRI, tuj sin turnis al Ĉina Esperanto-Ligo kun la peto ke ĝi sciigu al ŝi la adreson de la iniciatintoj. Baldaŭ ŝi ricevis la unuan leteron de s-ro Zhang Zhenzhi, la tiama prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio. Li estis jam 70-jara malnova esperantisto, kiu sin dediĉis por Esperanto eĉ en la plej severaj cirkonstancoj dum la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj. "Ni metu la idealon de Verda Majo sur la bazo de niaj estontaj kunlaboroj", li skribis en sia unua mesaĝo. Tio profunde tuŝis la koron de la samideanoj de Takatuki. Tiele komenciĝis la afero.

S-ro Zhang Zhenzhi tiam estis vicestro de la Pedagogia Kolegio de Changzhou, kie sidis la oficejo de Changzhou-a Esperanto-Asocio. Ĉar ankaŭ Esperanto-Societo en Takatuki havis kelkajn instruistojn kiel siaj membroj, ni do decidis, unue helpi la lerneajn geknabojn de ambaŭ urboj amikiĝi inter si per Esperanto. En novembro de 1986 la unuaj leteroj de gelernantoj de Elementa Lernejo Tunoe en Takatuki estis senditaj al tiuj de Dongfang Elementa Lernejo en Changzhou kun esperanta traduko. Kvankam la korespondado ne daŭris longe, oni tamen ne ĉesis teni la amikan rilaton de la lernejoj. En 1988, de la translokiĝo de samideana instruisto, la rolon prenis en la japana flanko Elementa Lernejo Yosumi, kies ĉefinstruisto estis s-ro Ukita Masaharu, la nuna estrano de Esperanto-societo en Takatuki. En 1987 kiam nia tiama urbestro s-ro Chen Hongchang vizitis al Takatuki, la flago kun la vorto AMIKECO donacita de Dongfang Elementa Lernejo estis sendita al Yosumi Lernejo per la urbestro de Takatuki. La lernejoj Dongfang kaj Yosumi oficiale ĝemeliĝis dank al la klopodo de la lokaj Esperanto-organizaĵoj.

De tiam jaron post jaro la amika rilato de ambaŭ lernejoj donis siajn fruktojn. Ili ne forgesis ĉiujare reciproki la gratulon al la geknaboj, kiuj finis la tutan studon de la lernejo. Foje kaj foje okazis interŝanĝoj de lernomaterialoj, videobendoj, desegnaĵoj kaj manlaboraĵoj de geknaboj. En la korto de Dongfang prospere kreskas amika arbo, kiun plantis la lernejestro de Yosumi memore al sia vizito en 1990. Kaj en Yosumi oni vidas flagon donacitan de Dongfang. En ambaŭ lernejoj Dongfang kaj Yosumi ŝanĝiĝis multe da lernejestroj tamen la amikeca rilato bonorde daŭris. Post kiam la novaj lernejestroj de Dongfang kaj Yosumi surposteniĝis, la unua afero por ili estis sendi reciproke mesaĝon esprimi siajn bondezirojn pri daŭriĝo kaj disvolviĝo de la amika rilato inter la du lernejoj. Esperantistoj de ambaŭ urboj tion subtenis jen tradukante la mesaĝojn jen perante la donacojn ktp.

La 6-5an de junio 1988 okazis en Takatuki la 36a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo,

Japanio. Invitite de Esperanto-Societo en Takatuki nia asocio sendis la delegacion kiu konsistis el s-ro Yue Deben, estro de la Changzhou-a Federacio de Socisciencaj Asocioj , s-ro Zhang Zhenzhi kaj s-ro Zhang Changsheng, la nuna prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio por partopreni en la kongreso. Post la kongreso la tri delegitoj restis 10 tagojn en Takatuki kaj vizitis la lernejon Yosumi. Tiu evento estis signifoplena ne nur por ambaŭ ĝemelaj lernejoj sed ankaŭ por la Esperanto-movado en ambaŭ urboj.

Ni devas substreki la fakton ke la Esperanto-kurso de Dongfang jam daŭris pli ol dek jarojn kiel oficiala lernoprogramo en la dua, kvara kaj sesa klasoj kaj antaŭ kelkaj jaroj naskiĝis Esperanto-kurso ankaŭ en la mezlernejo Qingtan, Changzhou, kie lernas kursofinintoj de Dongfang. En la novembro de 2001 sankciite de la eduka instanco de urba registaro ni starigis la bazejon en la mezlernejo nomata de "Bazo de Internacia Interŝanĝo por Eduko kaj Kulturo sub Changzhou-a Esperanto-Asocio". Kaj en 2003 funkciis kursoj kun Esperanto kiel oficiala lerno-objekto en Liuguojun Profesia Eduka Centro en Changzhou kie lernas parto de diplomigintoj de mezlernejo Qingtan. Nia Changzhou-a E-movado havas bonan disvolviĝon en la pedagogia kampo.

La 14an de novembro 2000 mi akompanis s-ron Takeuti Yosikazu, kiu estas eksvicprezidanto de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) kaj prezidanto de Esperanto-Societo en Takatuki al Dongfang por renkontiĝo kun lernantoj de E-kurso kaj estroj de la lernejo, Tio estis lia deka vizito al nia urbo. Kiam s-ro Takeuti kaj mi eniris la klasĉambron, niaj esperantistetoj ĝoje kriis al s-ro Takeuti ke lin ili iam konis. Jes, s-ro Takeuti multfoje vizitis Dongfang-an Elementan Lernejon kaj donis al ili profundan kaj neforgeseblan impreson. Antaŭ kelkaj jaroj kiam mi kune kun s-ro Takeuti promenis en iu vendejo en nia urbo, subite iu servisto de la vendejo diris al s-ro Takeuti: "Mi vidis vin en mia elementa lernejo." Kaj ili tuj familiare interparolis. Mi kortuŝiĝis dum ilia babilado. En la diskuto pri la estontaj edukaj progresoj niaj lernejoj kaj s-ro Takeuti interŝanĝis fotojn kaj materialojn en kiuj montriĝas edukaj agadoj de lernantoj kaj instruistoj en lernejoj. S-ro Takeuti donacis al la lerneja E-kurso E-librojn kaj E-sonbendojn por kuraĝigi la esperantistetojn kaj instruistojn de la lernejo pli bone lerni kaj instrui nian lingvon.

En Qingtan-mezlernejo, esperantistetoj estis pli viglaj kaj pli aktivaj. Estas rara sperto por ili ĉeesti lecionon faritan de fremdlanda esperantisto. Ili demandis en simplaj Esperantaj vortoj al s-ro Takeuti. S-ro Takeuti kun plezuro kaj fervoro respondis iliajn demandojn. Li jam estas 69jara kaj eklernis nian lingvon en mezlernejo. Kaj li fervore prezentis al la lernantoj bonan lernomanieron korespondi kun alilandaj esperantistoj en nia lingvo. Lia societo havas Esperantajn korespondantojn en pli ol 60 landoj kaj regionoj, kaj en tiu flanko li volonte helpas niajn lernantojn. Li skribis sian adreson kaj ret-adreson sur nigra tabulo. Li ankaŭ donacis al ĉiu lernanto E-libron por subteni kaj kuraĝigi ilin lerni diligente nian lingvon.

Ankaŭ en aliaj kampoj ni havas multe da kunlaboroj, ekzemple:

Je la 26a de aprilo 2000 nia asocio ricevis leteron de s-ro Nakatu Masanori, estrarano de Esperanto-Societo en Takatuki, en kiu li skribis: "Internacia Asocio de Takatuki, unu el oficialaj instancoj de la urbo Takatuki petis nian societeton, Esperanto Societo en Takatuki, ke ni kolektu magazinojn presitajn en la nacia lingvo. Tiam tio ne necesas, ke ĝi estu nepre nova. Bonvenaj estas ankaŭ tiuj, kiujn oni jam ellegis. La instanco deziras montri al la urbanoj, ke en la mondo estas tiom da lingvoj kiom da nacioj. Ĉar japana registaro povus alpreni la anglan lingvon kiel la duan oficialan lingvon. En tia cirkonstanco la Internacia Asocio de Takatuki intencas montri al la urbanoj realon en la mondo. Kiel esperantistoj ni, membroj de Esperanto-Societo en Takatuki estas tre ĝojaj pro tio, ke la urbo agnoskas Esperanton kaj petis nin por kolekti tutmonde tiajn

magazinojn. Bonvolu kunlabori kun ni kaj sendi al jena adreso magazinojn, kiujn legas ordinaraĵaj personoj ĉe vi en ĉiutaga vivo. Ni preferas, ke oni facile divenu en la magazino el kiu lando ĝi estas sendita." Al tiu peto niaj membroj tuj sendis al ili la bezonatajn magazinojn. Ĉiujare Esperanta Ekspozicio en Takatuki ofte ricevis la materialojn el Changzhou-a Esperanto-Asocio.

En 1990 Changzhou Traktora Teknika Instituto transdonis al nia asocio sian peton ke ni havigu al ili specimenojn de novtipaj ilmaŝinaj amortiziloj faritaj de Japanio. Ni sciigis tiun bezonon al nia amikeca societo. Nelonge poste ni ricevis kvar amortizilojn kiel donacojn senditajn de s-ro Nisikawa, eksprezidanto de Esperanto-Societo en Takatuki. Li estas ankaŭ elstara entreprenisto en Takatuki. La Shanghai dogano kredis, ke tiuj amortiziloj estas donacoj anstataŭ importaĵoj kaj postulis de ni doganpagon. Post kiam ni prezentis la ateston de nia urba registaro de Changzhou la Shanghai dogano donis al ni la amortizilojn. Poste ni transdonacis la amortizilojn al la instituto kaj ricevis la repagon kiel premion de la instituto kaj nia financa institucio en la urbo kaj aliaj kiuj bone subtenis nian lokan E-aktivadon, kaj tio donis grandan influon ne nur urbe sed ankaŭ publike.

Ni simple skizis la historion de nia loka E-movado pri kunlaboro kun nia ĝemela urbo. Ni resumas niajn spertojn kiel jene: Unue ni metis nian prioritatan celon krei modelon de kunlaboroj de esperantistoj en ĝemelaj urboj, kaj trovis praktikan eblecon en la projekto helpi la ĝemeligon de lernejoj. Due ni prezentis la sukcesan rezulton al la koncernaj instancoj de la urbo, kiu respondecis pri la internaciaj kulturaj interŝanĝoj. Ni ne forgesis tion konigi ankaŭ al la publiko liverante novaĵojn al la redakcioj de lokaj gazetoj. Trie ni senĉese konvinkis la magistratojn pri la bezono de Esperanto montrante konkretajn laborfruktojn kiel fidindajn atestaĵojn. Ŝajnas ke tiurilate ni lernas multe de Esperanto-Societo en Takatuki kiu havas pli multe da spertoj en sia 39jara funkciado. Nun multe pliboniĝis la cirkonstancoj, en kiuj ni aktivis. Ni jam havas nian oficialan asocian ĉambron, kie ni regule kunsidas kaj kelkajn individuajn membrojn de UEA kaj nian TTT-paghon (<http://www.china-esperanto.com>). Nun nia magistrato kaj publiko pli alte taksas nian E-aktivadon, kaj tio multe akcelas nian aktivadon. Certe la kunlaboroj de Esperanto-organizaĵoj inter ĝemelaj urboj havos ĉiam pli grandan signifon en nia estonta agado. (ĉi tio estis artikolo de s-ro Zhang Changsheng, Prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio, Ĉinio, la parto el ĝi estis prezentita en la unua kunveno pri ĝemelaj urboj)

SERVA PLATFORMO

Mongolio

S-ro Chimedtseren ENKHEE, Estrarano de Mongola Esperanto-Societo kaj Asista direktoro de la Kolegio pri sociaj sciencoj, havis proponon pri ĝemeligo inter universitatoj kaj kolegioj, interesiĝantoj rekte kontaktu lin pere de ĉi-retadreso: pacosuno@magicnet.mn (el la mesaĝo de Germain Pirlot)

Italio

S-ro Duilio Magnani (duiliomagnani@iol.it) el Rimini, Italio estas serĉanta samideanojn en la ĉina ĝemelurbo Yanzhou.

Redaktoro: Wu Guojiang / komisiito de UEA pri la projekto "Ĝemelaj Urboj"

Adreso: Fushun Shiyoyichang Yanjiusuo

113008 Fushun Liaoning Ĉinio

Telefono/Fakso: +86-413-2650322 (fakso post la 5-a sonorilo)

Retadreso: amikeco999@21cn.com ghemelurboj@yahoo.com.cn